Decembro 1952 N-ro 421 Jarkolekto 49

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuigo. Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbe Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj administracio Espero Katolika VLEUTEN (Utrecht), Nederlando.

Kunlaborantoj d ro E.J.Gorlich (Austrujo), Robert Ernst,sac.(Belgujo) Ludwig Thalmaier,sac. (Germanujo.) J.Vernoux,sac. (Francujo,)Eusebio. Maynar (Hispanujo,Prof.H.G.Wannemakers S.J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W.J.A.Manders (Nederlando),d-ro W. Solzbacher (Usono,).

PACO!

Denove forpasis jaro. Denove sonas sur la tuta tero la Kristnaska Saluto 'Gloro al Dio en la ĉielo kaj paco sur la tero al la homoj de bona volo' Laŭ la historiistoj la naskiĝnokto de Nia Sinjoro Jesuo Kristo estis eble la sola nokto en la historio ke ne estis milito,revolucio k.c sur la tero. La granda roma imperio nur konis tiutempe tian pacan situacion. Kaj nun, ni homoj sopiras al la paco nin faras iluziojn por akiri staton kiun ni ne konas. Tamen ni forgesis gravajn faktojn el la kristnaska saluto' Unue ni devas doni gloron al Dio. Nepre ni rekonu ke almenaŭ en Eŭropo ni forgesis fari tion publike kaj en komunumo Post la Mezepoko Eŭropanoj fariĝis individualistoj Pasis la tempo de la konstruado de la grandaj katedraloj Aperis la renesanco kiu donis al la homo la centran intereson,la renesanco kiu naskis la adoradon de persona kaj nacia sukceso kiu en la moderna tempo evoluis tiel ke nederlanda poeto skribis 'Mi estas dio profund' en miaj pensoj Estas granda kontrasto inter la vortoj sonitaj je la Krista Naskiĝo kaj tridek jarojn pli poste kiam li diros Mi ne alportas la pacon sed la glavon . Sed tiu kontrasto nur estas ŝajna ĉar ne forgesu ke por akiri la kristnaskan pacon oni devas esti de bona volo. Sankta Paŭlo pli poste klargis tiel 'Gardu la pacon tiom kiom ĝi dependas de vi Ne evitu la glavon la batalon, sed nur estante certe ke vi faris ĉion eblan por la paco. Plej grave tamen estas ke ni estu en paco kun Dio.Tio ebligas al ni akcepti el Liaj Manoj, lau la de Li donita ekzemplo la malkvietaĵojn de la mondo. Kvazaŭ nature Li akceptis la sobrecon ĉe Lia Naskiĝo poste Li estis dislokigita persono Li kverelis kun la farizeoj,Li suferis, kaj ĉio por nia savo. La paco kun Li donu al ni la fortojn tolereble porti la mal facilaĵojn de la vivo por ke ni servu al niaj gefratoj en Kristo.Dibenitan Kristnaskon kaj Feliĉan Novjaron!

LA POSTRESTAĴOJ DE SANKTA FRANCISKO SAVERIO.

La 3an de decembro ni memoris la 500an datrevenon de la morto de l'plej eminenta apostolo de Hindujo, S. Francisko Saverio. Kiel oni scias, li mortis dum misia vojaĝo al Ĥinujo, sur la insulo Sanciano, kie oni enterigis lian postrestaĵon apud lia kabano kaj post mallonge transportis ĝin, envolvitan en neestingita kalko, al Malako, kie ĝi denove estis enterigata. Post jaro ĝi estis elfosita kaj trovita ankoraŭ tute sendifekta. Oni portis ĝin al Goa en Antaŭ-Hindujo kaj donis al ĝi honoran restadejon en la katedralo, kie ĝi ĝis nun ripozas. Grandan honoron ankoraŭ ĉiam montras al Francisko ne nur la katolikoj de la lando, sed ankaŭ ne kristanoj, kiel Hindoj kaj Mohametanoj, kiuj milope vizitas lian tombon.
Monsinjoro Considine rakontas post sia pilgrimado jenon
'La iam tiel fiera kaj prospera komerca urbo Goa estas en dekadenco. Konstruaĵoj kaj palacoj estas detruitaj kaj nur kvar el la dudek preĝejoj restis. Mortigaj marĉaj vaporoj supreniras el ĉiam malseka tero, la naturo estigis densan, tropikan vegetaĵaron kaj afablaj lianoj kovras la kadavron de la mortinta urbo al la okulo La tombo de S.Francisko leviĝas kiel granda sanktejo en la arbaro. En la malnova baroka preĝejo de Bom Jesu (Bona Jesuo) ĉiujare dum vizito de pilgrimantoj la grandvalora sarkofago de Francisko estas portata al la centro de la preĝejo apud la ĥoreja balustrado. La antaŭa parto de la ĉerko estas forigata kaj la piedoj de la sanktulo videbliĝas. Grandegaj homamasoj en viciĝas antaŭ flankpordo silente iras al la korpo, kisas la piedojn foriras laŭ alia vojo. En la homa maro, kiu malrapide preterfluas la piedojn de Francisko estas reprezentataj ĉiuj rangoj klasoj kaj kastoj. parto aspektas laŭ vestaĵo kaj sinteno riĉa kaj aristokrata la plimulto estas dece kaj bone vestita malgranda nombro kiuj sentas sin absolute hejme en la domo de Francisko, apartenas al tre malalta klaso, laŭ sia vestaĵo konsistante el ne plu ol lumbkovrilo Almozpetantoj trankvile staras ĉe la enirejo, impona estas la vido kiel multaj pilgrimantoj kiuj evidente mem nur malmulte posedas palpas en siaj vestoj malnodas malpuran tukon prenante el ĝi kelkajn moneretojn por distribui inter la malfeliĉuloj .... Ĉiujare multaj mirakloj okazas, kiuj, same kiel en Lourdes, estas serioze ekzamenataj de kompetentaj kuracistoj Multnombraj malsanuloj, kripluloj, blinduloj kaj paralizitoj vizitas la pilgrimejon por tuŝi kun helpo de kuracisto, la sanktan korpon kaj oni povas imagi la nepriskribeblan feliĉon de patrino, kiu portis sian paralizitan infanon al la tombo: la infano kisas la piedojn kaj propraforte foriras el la preĝejo Post fino de la pilgrimoj, (meze de Decembro) okazas oficiala ekzameno de la postrestaĵo de la admirinda apostolo de Azio. La korpo, vestita kiel por la S.Meso, estas prenata el la sarkofago kaj metata sur tablon. Komisio de kvin kuracistoj respektplene kaj pie faras la ekzamenen. Rimarkinde estas, ke ankoraŭ troviĝas haroj sur la kapo kaj certaj postsignoj de vejnoj estas ankoraŭ videblaj. En la dekstra vango profunda kavaĵo kaŭzita per akcidento dum la transporto el Malako, kaj la nazo estas iom platigita pro alia akcidento. (Laŭ deklaro de unu el la kuracistoj la homoj kaj ne la naturo difektis la korpon.) La vizaĝo de S.Francisko estas terkolora kaj deformita sed tute ne abomena. Delikata membrana haŭto kovras liajn okulojn kaj la maldikaj lipoj estas fermataj super la dentoj en tute naturo maniero. Ŝajnas ke la haŭto malligigis de la malantaŭa parto de la kranio kaj la maldekstra vango estas iomete sulkigita. La dekstra malsupra brako, kiu verŝis la baptakvon sur centmilojn da kapoj, estas amputita kaj gardata en la Jesuo-Preĝejo en Romo kaj honorigata en multekosta relikvujo. La maldekstra brako kuŝas sur la brusto ripozante sur la kazublo. La maldekstra mano estas mirinda, la haŭto estas sulkigita kiel tiu de okdekjarulo, sed molakiam oni ektuŝas ĝin, oni povas senti ĉiujn muskolojn kaj vejnojn.
La piedoj, kisitaj de milionoj kaj tuŝitaj per nekalkulebla nombro da religiaj objektoj, estas iom pli atakitaj de la detruo. Sed pripalpante la tarson oni rimarkas ke la haŭto estas mola kiel veluro kaj la muskoloj flekseblaj. Tiel estas la stato de la korpo de Francisko post kvar jarcentoj: ĉiujare la medicina scienco faras sian ekzamenon, sed ne povas trovi naturan klarigon por ĉi tiu fenomeno. Fine la Ora Sonorilo de Bom Jesu denove

dissendas siajn riĉajn sonojn super la kokospalmojn kiel signon ke la pilgrima periodo estas fermita. La multekosta sarkofago el oro kaj arĝento procesie revenas en la kapelon: la Torĉo de Hindujo' denove restos sola en la senbrua sanktejo de la nun neloĝata urbo. La preĝejaj silentante leviĝas super la junglo... Sufokige varmaj ventoj senĉese moviĝas la palmarbojn kaj ilia bruetado simbolizas la flustradon de preĝoj kaj petegoj kiuj el ĉiu regiono de l'mondo estas adresataj al S.Francisko Saverio.
Estas kortuŝe kiel la Goanoj, disiĝintaj aliloke en la mondon, rememoras sian patronon je lia festo. Ankaŭ en argila vilaĝa kapelo en afrika praarbaro ili prizorgas specialan S.Meson, dum kiu ili kantas himnojn en sia propra lingvo, akompanataj per violonoj kaj mandolinoj.Ĉiu laŭorigina Goano portas inter siaj baptonomoj ankaŭ tiun de Francisko.
La Torĉo de Hindujo' elradiu la lumon de graco kaj kredo super la milionojn da idolanoj de la Ekstrema Oriento!

Jos. Muris, s.m.m.

KATOLIKA PRESEJO EN INDONESIO

Sur la insulo Java, en la urbo Djokjakarta, troviĝas la presejo 'Canisius', kiu tre utilas al la Eklezio, plenumante veran apostolaton.En 1922 ĝi estis fondita en malgranda salono en kvartalo je la rando de la urbo; en 1934 translokiĝita al granda barako, la antaŭa unua preĝejo,en la centro.Nuntempe laboras tie 75 personoj sub gvidado de Frato Balduinus de la Kongregacio de Nia Sinjorino Senmakula de Maastricht (Nederlando). Ĉiuj plenumas sian taskon kun granda dediĉemo, ĉefe dank' al la bonegaj sociaj kondiĉoj. La salajroj estas altaj kompare kun tiuj en aliaj presejoj.Al viro havanta nur unu edzinon estas pagata subvencion laŭ la nombro de infanoj, kiun aranĝon oni faris por kiel eble plej efike malhelpi la poligamion. Krome ĉiuj laboristoj ricevas malavaran parton el la profitoj de la enterpreno kaj kiam la prezoj de la manĝaĵoj multe altiĝas, kiel ekzemple de la rizo en la monatoj Decembro kaj Januaro oni disponigas al ĉiuj laboristoj porciojn kontraŭ tre malaltigitaj prezoj. La planoj por la venontjara starigo de pensikaso, kio en ĉiu alia loko de Indonesio estas ankoraŭ nekonata luksaĵo, jam estas pretaj.

Tiu ĉi presejo eldonas du revuojn, la 'Praba' en java lingvo aperas ĉiudumonate en 2700 ekzempleroj, kaj la 'Basis' en indonesia lingvo ĉiumonate en 5000 ekz. Krome oni presas multajn aferojn en la lasta jaro ekzemple 160.000 librojn kaj broŝurojn.

La mendoj estas tiel grandnombraj, ke Frato Balduinus estas devigata ankoraŭ pligrandigi la personaron, la venotan jaron li esperas labori kun cent personoj.

Signifa jubileo de la Viena ĉefpastro

La katolikaro de Vieno kaj kun ĝi de tuta Aŭstrujo kaj en pli vasta senco ties popolo entute havis la vere ne oftan okazon, dimanĉe la 19an de Oktobro ĉ.j. festi la 50-jaran pastran jubileon kaj samtempe la 20-an episkopan jubileon de sia amata kaj eminenta ĉefpastro kardinalo ĉefepiskopo **d-ro Theodor Innitzer**. La kara jubilanto estas ankaŭ bone konata kiel sincera amiko kaj granda akcelanto de Esperanto kaj la Esperanto-movado,precipe de nia katolika Esperantomovado. La katolikaj esperantistoj do tutkore aliĝas al la multnombraj gratulantoj kaj deziras kaj preĝas je riĉa beno abunda graco por 'sia' episkopo!
Je la unua Kristnaska Tago venonta Lia kardinala Moŝto havos 71 jaron. Al niaj gratuloj ni aldonas la deziron, ke Li baldaŭ konu la veran mondan pacon en sia diocezo, kiu troviĝas je la limo inter persekuto kaj libereco.

* * *

PRUVATA FIDADO EĈ NUNTEMPA!

De B.K.

En iu mirinda mateno de Decembro ni intencis marŝi sur la sanktan monton Luŝari, tiu juvelo en la ŝtona diademo de la Alpoj Juliaj sur la limoj de Aŭstrujo, Italujo kaj Jugoslavujo. Bluega ĉielo arkiĝis super la rokaj muregoj de Mangart, super la fiera kresto de Wischberg kaj la kalvaj kapoj de Triglav. Sur la sovaĝa deklivaro de la Ŝtona Ĉasisto la suno matena kuŝas kiel ruĝoro kaj la Dobraĉ boris sian rokdentaron en la klaran aeron de la vintro.
Vilaĝoj kaj dislokitaj bienoj revadis en solena senbrueco kaj sur paŝtejoj kaj herbejoj la pruĵno briletis kiel arĝentaj vualoj. Ni ekhaltis sur la komenco de la tiu vojo pilgrima, kiu eble kvaronan horon for de Saifnitz branĉiĝas de la strato. Ŝtona angelo tie grandas, per mano montrante al la Monto Luŝari. Do, jen la ĝusta vojo. Marŝante en la bona odoro de egaj koniferoj ni aŭdis malantaŭe kraketadon de branĉoj. Ĉu ne plu ni estis solaj. Ni turnis nin kaj ekvidis du virinojn, kiuj el la arbetajaro suriris la vojon. La unu povis havi tridek jarojn, la alia iom pli. Ili estis preskaŭ maskitaj per dikaj tukoj kaj vera rado el pezaj jupoj ludadis ĉirkaŭ iliaj altbotoj tute kovritaj per neĝo. Tuj ni ekkonis Sloveninoj.
La pli aĝa de ambaŭ portis sur la dorso grandan korbon kaj apogis sin per la dekstra mano sur tuberan bastonon. Ili alproksimiĝis malrapide kaj poste salutis nin afable. 'Hvaljen bodi Jezus Kristus' (Laŭdata estu Jesuo Kristo!) 'Ho, ni iras la saman vojon', ni respondis kore. 'Vi ja ankaŭ pilgrimas al Maria-Luŝari?'
Jes, supren en la preĝejon', kapjesis la pli aĝa. Ŝi parolis mallerte germane, sed tamen ni komprenis ŝin bone. 'De kie vi venas, kara virino? De malproksime - sur la longa vojo de Raibl. Ankoraŭ dum la mallumo ni ekmarŝis kaj migris jam tri horojn. 'Kun tiu ĉi granda korbo?' Ĝi sajnas tre peza. 'Ho oni devas marŝi sun iom atente', nun la juna slovenino ridetis mistere. Infaneto enestas. 'Infano?' Ni estis tre surprizitaj. En la korbo oni vidis nur kovrilojn, lanajn kovrilojn kaj malnovan pelton de ŝafo, nenion krome. 'Knabeto estas..... kaj lin ni portas al la bapto.
'Tiel malproksimen...tra malvarmo kaj neĝo?' 'Sinjorino sciu', la juna slovenino diris simple, 'li estas mia unua infaneto kaj mi portas lin al la Dipatrino. Li estu baptata tie supre. 'Kaj kiel li nomiĝos?' 'Miklaj Niĉjo - Nikolao. 'Ho...!' 'Tiel nomiĝis mia karmemora avo kaj mia patro. Kaj tial ni baptigos la infaneton ĝuste hodiaŭ. Kaj poste ŝi rakontis. Malriĉaj tre malricaj ili estas, ŝi kaj ŝiaj edzo kaj fratino, kiu kiel baptopatrino portis la infanon en la korbo. En la valo ili posedis kadukan dometon kaj la edzo estis lignohakisto ie en la arbaro Karintia. Kion li perlaboris dum semajno, sufiĉas por la plej necesaj bezonoj. Sed nun ili estas feliĉaj pro la hometo, kiu en la korbo dormas kaj supre sur la Monto Luŝari devos fariĝi infano de Dio, kun la nomo Miklaj. Silente mi cerbumis, kiel oni povus neatentate bonfari al la juna patrino. Kaj ĝuste nun surprizo okazis. Apud la vojo situis sbleĉa bienovilaĝo jus iris el la pordo. Ni rimarkis nur ekbrilon inter la arboj. Poste renkontiris al ni du figuroj. Ja, kio estis? Apenaŭ ni fidis al niaj okuloj. La Sankta Nikolao vere, la sankta Nikolao! Altulo en blanka ĉemizo kun diverskolora tuko ĉirkaŭ ŝultroj, kun alta, ora ĉapo el papero sur la kapo kaj iom malfirma episkopa bastono en la dekstra mano. Ĉe li paŝis knabo aĝa eble dek jarojn, kiu portis malplenetan sakon, kredeble kun la resto de dolĉaĵoj.
'Jen vidu, mi diris mirante al la sloveninoj, 'de kie do venas sankta Nikolao jam tiel frue?' 'Ho' opiniis la malpli juna, la baptopatrino, hieraŭ vespere ili estis Miklaŭs-kantistoj kaj ja pasigis la nokton en la bieno, ĉar la mallumo ilin surprizis. Nun ili reiras hejmen.
En tiu momento la sankta Nikolao staris antaŭ ni kaj la duan fojon ni aŭdis

la karan 'Hvaljen bodi Jezus Kristus
'Kara sankta Nikoloa', mi diris serioze, 'vi venas kvazaŭ dezirite. Ĉu vi scias, ke en tiu ĉi dorsa korbo estas knabeto, kiun oni portas al la bapto? Kaj pensu, li nomiĝu Niĉjo kaj fariĝu via speciala protektato
'Ĉu, ĉu', Nikolao klopodis murmuri basege. 'Espereble li fariĝos tre bona Joĉjo, metu en la korbon kelke da prunoj kaj figoj!' La knabo ekserĉis detaleme. La virinoj ridetis kiel infanoj kaj ne rimarkis ke mia kunulino intertraktis rapidege malantaŭ ili kun S.Nikolao kaj ion metis en lian manon. Ĉi tiu ekkondutis solene kaj donis al la juna patrino kelkajn grandajn monerojn el arĝento. 'Jen baptotaleroj por la malgranda Niĉjo. Ilin donacas la sankta Nikolao. La virino ektremis, ŝia vizaĝo estis kvazaŭ surŝutata per sango..... ŝi fikse rigardis la monerojn. 'Ne....ne estas tro multe.'
'Kion sankta Nikolao donacas, ĉi tion oni prenu' mi interdiris mallaute.
'La baptotaleroj venigu feliĉon al la knabeto!' Kun tremantaj manoj la slovenino fingrumis sub sia ŝultrotuko kaj enpoŝigis la monerojn.
'Dio kompensu!'
Baldaŭ ni ĉirkaŭiris la lastan monteron. Tie - malmultaj cent paŝoj antaŭ ni ni vidis la preĝejon kun ĝia simpla, dika kvarangula, turo, la tutaĵo konstruita al deklivaĵo de la monto, ĉirkaŭita de malmultaj domoj kaj duobla vico da vendostandoj. Post eble dek minutoj ni devis esti supre. La ambau sloveninoj haltis momenton, klinis sin kaj duan fojon ni ne fidis al niaj okuloj-demetis siajn tubobotojn kaj ŝtrumpojn. 'Kion vi faras?'
'La lastan vojparton ni iros per nudaj piedoj.' 'En la neĝo? Sed....Sed.. 'Ĝi ne malutilas. Sciu, sinjorino, infanon baptotan oni devas nudpiede porti en la preĝejon. Tiel ni kutimas.' Sed ili faris nur kelkajn paŝojn; ĉar subite ili ekgenuis kaj glitis per la genuoj tra la preĝejo. Samtempe ili ekkantis. La slovena melodio sonis melankolie tra la klara mateno en vintro....kaj ni apudiris kortuŝita, preskaŭ hontante. Ĉe la pordo de la preĝejo ni ne vidis pilgrimanton. Ja ne estis festotago, ne festo de Maria, en la kalendaro oni legis nur S.Nikolao, episkopo kaj konfesinto.
Franciskana pastro aliris nin La juna patrino timeme konfesis, ke ŝi estas malriĉa, ne scias baptopatron sole sia fratino venis kune. 'Ne gravas, ne gravas' la pastro konsolis. 'Envenu: ĉiuj!' Kaj poste ni genuis antaŭ la gracoplena, sankta Dipatrino, kiu sur la maldekstra brako portas la Jesuin fanon. Ni povis vidi nur la kapojn de la patrino kaj infano, la cetera korpo estis kovrita per rigida silko kaj arĝenta mantelo. Jen ŝi estis, la eminenta ĉiela sinjorino de la Monto Luŝari kaj el profunda animo levigis nia preĝo Vi benita, kompatema benu kaj ŝirmu la malgrandan Niĉjon

El 'Wiener Kirchenblatt

Ni ne forgesu aŭ forlasu la pian genton de la slovenoj terure provata depost 1941 sed tamen fidela al niaj komunaj idealoj kiuj estas veraj.

D-ro A.H.

DEKLARACIO DE LA KATOLIKA KONGRESO AŬSTRIA EN VIENO

La katolika kongreso aŭstria 1952 en sia finmanifestacio sur 'Heldenplatz en 'Vieno' la 14an de Septembro 1952a devigis sin agi laŭ jenaj principoj.

1e. Libereco kaj digneco de la homo devenas de Dio. Pro tio la eklezio estas ilia kompetenta advokato Ni katolikoj vokas al rezisto kontraŭ la totaleca ŝtato, kontraŭ ĝiaj konsciaj kaj nekonsciaj agentoj al defendo jam kontraŭ ties unuaj komencoj ankaŭ en nia publika vivo.

2e. La sufero de la lando estas ankaŭ la sufero de la eklezio. Ni katolikoj estas unusentaj kun la tuta popolo en la batalo por la libereco de Aŭstrujo. Ni vokas la katolikojn de la mondo: Helpu Aŭstrujon - savu Eŭropon!

3e. Malkonkordo kaj parti-politika egoismo estas serioza danĝero. Ni katolikoj konfesas nian kunlaboremon kun ĉiuj de bona volo. Estu retenemaj en la politika polemikado, forigu la barikadojn de hieraŭ.

4e. La ŝtato ne estas partia posedaĵo.
Ni katolikoj postulas la taksadon de karaktero kaj laborkapableco sen konsidero je partio-membrokarto kaj je proktektantoj.
5e. La ŝtato ne estas estro pri la konscienco.
Ni katolikoj postulas la plenan kaj jure sekuritan liberecon por la eklezio, t.e. la malkaŝan kaj sinceran rekonon de la konkordato kontraktita de Aŭstrujo. La venkigon de la gepatra rajto en lernejo kun libera elektebleco flanke de la gepatroj; la forigon de la devigo al ŝtata edziĝo.
6e. La atingo de la libereco postulas oferon kaj sindonon de ĉiu unuopulo
Ni katolikoj pledas por justa realigo de la ĝeneralaj ŝarĝoj, ni admonas je modesteco en la vivmaniero de ĉiuj, ni kondamnas troajn profitojn kaj provokantan lukson.
7e. La familioj estas la estonteco de la ŝtato.
Ni katolikoj postulas rapidan kaj efikan akcelon de la familioj per fondado de profamiliaj kompensaj kasoj kaj pli intensigitan helpon al konstruado de loĝejoj kaj propraj hejmoj.
8e. Sen propraĵo la homo fariĝas sklavo.
Ni katolikoj postulas justan salajron por ĉiu, ankaŭ por la intelekta laboro: impostan politikon vekanta laboremo kaj ebliganta la kreon de posedaĵo en la plej larĝaj rondoj.
9e. Demokrateco postulas kunlaboron de ĉiuj, ne nur kritikon.
Ni katolikoj vokas ĉiun unuopulon al respondeco por la komuna bono. Ne lasu la politikon al la malamikoj de la kredo kaj al la negociemuloj! Ĉe politikaj decidoj ne laste konsideru mondrigardajn demandojn.
10e. La paco estas la frukto de la libereco kaj la justeco.
Ni katolikoj pasie konfesas nin anoj de la vera paco inter homoj kaj popoloj. Sed ni kun abomeno rifuzas la hipokritecon, kiu parolas pri la paco sed opinias subigon.

Katolikoj de Aŭstrujo!

Per tiu ĉi deklaro ni devigis nin al agoj. La voko de la nuna horo nomiĝas: **Katolika Agado!**

trad. W. Mudrak.

Rimarkoj: Koncerne menciita konkordato temas pri la konkordato, farita kun la Sankta Seĝo de la iama aŭstra registaro je 5-VI-1933 sub kancelierod-ro Dollfuss. La valideco de la kontrakto ankaŭ por nun estas postulata. Precipe la socialista partio kontraŭas tion.
Deviga ŝtata edziĝo estis en Aŭstrujo enkondukata nur 1938 (post aliĝo de Aŭstrujo al Germanujo) de la nacisocialista registaro, sed koncerna leĝo ankoraŭ nun validas ankaŭ en tiu rilato ĉefe la socialista partio estas por la plua valideco de tiu, en kundependo kun la aliĝo al Germanujo enkondukita leĝo, laŭ kiu eklezia edziĝo (do la ricevo de la sakramento) estas permesata nur post plenumo de la ŝtata edziĝo. Korcerne lernejo Ekzistas momente grandparte superkonfesiaj ŝtataj lernejoj kun oficiala instruado de religio, kaj katolikaj privataj lernejoj (de la ŝtato oficiale tolerataj kaj rekonitaj) sen ŝtata subvencio. Do la gepatroj devas pagi resp. vivteni ilin. La postulo de la Katolika Kongreso estas:
Por katolikaj infanoj katolikajn lernejojn ĝeneralajn.

* * *

LA ORIGINO DE LA KRISTNASKARBO

Abio vi, abio vi.... ni kantas ĉiujare, kiam ni sidas ĉirkaŭ la kristnaskarbo, sed nur malmultaj el ni konas la devenon de la kristnaskarbo. Ĉu la kutimo de la kristnaskarbo estas tre malnova? Kvankam la gusta deveno ne estas konata - ekzistas nur legendoj pri ĝi - tamen respondas la historiaj funtoj almenaŭ pri la evoluado de la kristnaskarba kutimo ĉi tiun demandon. Unue mi rakontu pri la legendoj! Laŭ germana legendo Luther elpensis la kristnaskarbon. Kiam li je kristnaskvespero vojaĝis hejmen, la vido de la astroj multe impresis lin. Kaj kiam li klopodis klarigi tion al sia edzino, li ekhavis ideon. Li kuris en la ĝardenon, kie li dehakis malaltan abion.

Post kiam li portis ĝin en la domon, li fiksis kandelojn sur la branĉojn kaj ekflamigis ilin.
Alia legendo asertas, ke Sankta Vinfrido, misiisto en Norvegujo, elpensis la kristnaskarbon. Ĉar la loĝantoj adoris arbojn, li provis konvinki ilin, ke ili eraras. Tiucele li dehakis altan kverkon, kaj post kiam la kverko falis, oni ekvidis malaltan abion. La sanktulo diris al la homoj 'Vidu tiun malaltan abion, ĝi ŝajnas infano en la arbaro. Hodiaŭ v espere ĝi estos via arbo, ĉar ĝi estas ligno de la paco kaj viaj domoj estas faritaj el tia ligno. Ĝia foliaro estas signo de senfina vivo, ĉar ĝiaj ping letoj estas ciam verdaj .
Kaj nun pri la evoluado de la kristnaskarba kutimo en Germanujo. La kutimo pri la kristnaska arbo ne estas tiel malnova kiel ĝi unuemomente ŝajnas. En la dumviva tempo de nia granda germana poeto Goethe la kutimo de la dekoracio de kristnaska abio ankoraŭ ne estis tre konata. Eĉ antaŭ 150 jaroj oni kulpigis la kristnaskarbon kiel kaŭzo pro granda forstkrimo kaj dehaki kristnaskarbojn ankoraŭ estis afero monpunenda. Ankoraŭ en jaro 1808 estis malpermesata la vendo kaj aĉeto de kristnaskaj arboj en orienta Turingujo. Pri la unuaj kristnaskaj arboj ni estas informitaj per la malpermesoj pri ĝi. En la jaro 1710 estis malpermesata al forstaj laboristoj senarbigi la arbaron pro kristnaskaj arboj. En la jaro 1765 minacis al ĉiu pro la sama kaŭzo monpuno de kvin taleroj aŭ 14 tagoj en la malliberejo. La unua regula kristnaskarba foiro estis ekzemple en Turingujo dum la regado de la duko Karlo Augŭsto la amiko de Goethe. Li permesis la vendon de tiuj kristnaskaj arboj, kiuj faligis la forstistoj en partoj de la arbaro, kie ne estiĝis malutilo. Jam post kelkaj jaroj la vendado de tiuj arboj estis bonvena duagrada komerco por la forstoficoj. Certe la ministro Goethe influis sian dukon Karlon Aŭgŭston laŭ tiu senco. Goethe estis ankaŭ la unua poeto, kiu prezentas la kristnaskarbon en la mondliteraturo, nome en La suferoj de la juna Werther'. Ŝajnas ke Weimar estas ankaŭ la elirpunkto por la kutimo starigi grandan lumigitan komunan kristnaskarbon sur la foirejo. Post la kontraŭnapoleonaj militoj la librovendisto J W. Hoffmann starigis kiel unua komunan kristnaskarbon por malriĉaj infanoj.

Josef Steppan

LA KOMPLEZA VIOLONISTO

Iun akre malvarman kristnaskan posttagmezon du sinjoroj pasis tra malgaja londona strato apud la Tamiso. Subite ili ekvidis blindan, mizeran maljunulon kurbiĝantan pro malvarmo, pene elŝirante melodion al sia violono. Unu el la preterpasantaj du sinjoroj alproksimiĝis kaj diris en tre kripla angla lingvo. Malbonŝanco, ĉu? Neniu donas monon. Ĉu malbona tago? - La tago de Kristnasko ĉiam estas bona, sinjoro respondis la maljunulo. Sed estas terure malvarme kaj neniu deziras malfermi le fenestrojn. -Devigu ilin! - insistis la eksterlandano Ludu ĝis kiam ili nepre devas malfermi la fenestrojn! - Se mi nur povus tion! sopiris la alia. Subite la sinjoro prenis la violonon el liaj manoj kaj demetinte siajn gantojn, ekludis. El la violono venis nekredeblaj notoj kaj melodioj. Fenestro estis malfermata, poste alia kaj ankoraŭ alia. La moneroj falis kiel pluvo en la ĉapelon kiun la akompananto de la sinjoro etendis sub la fenestroj. Ne daŭris longe antaŭ ol la tuta strato aperis je fenestroj kaj pordoj. Kiam la muziko ĉesis granda amaso da arĝentaj moneroj plenigis la poŝojn de la blindulo. Vian nomon, sinjoro - diru al mi vian nomon! petegis la miregita maljunuleto, kiam li rericivis la violonon en siajn manojn.
- Li nomiĝas Paganini, - respondis al li la akompananto de la brila artisto.

T.D.



La Landa Ligo de Katolikaj Esperantistoj formis jenan

Organizan Komitaton:

rev.pastro Jean Vernoux,S.C.J.LILLE
s-ro R.Colas, PARIZO
f-ino Cecile Royer, PARIZO
s-ro J.Piron, SARTROUVILLE;
f-ino Jeanne Le Boedec, PARIZO;
sekretariino.

Loka Kongresa Komitato:

sekretario: s-ro A.Hasaers, 3 Rue Baron Duprat, LOURDES (H.P.)

Aliĝilo.

En ĉi tiu numero vi trovos aliĝilon. Bonvolu tuj decidi ĉu vi ĉeestos en nia jubileo en Lourdes. Se vi scias certe ke vi ne povas ĉeesti,tamen vi povas aliĝi al la pilgrimkongreso! Tiamaniere vi tutkore subtenas nian movadon. Pluraj aliĝiloj estas haveblaj ĉe nia oficejo.

Kongres-Dokumentaro.

La kongreslibro enhavos la programon, la parteprenantojn, la kantojn kaj religiajn pregojn, ktp. Ĝi estos sendata sufiĉe frue perpoŝte al la parteprenantoj. Jam nun ni povas anonci ke predikos aŭ prelegos pastro J.N.Machado S.J. el Brazilo

Ekskurzoj

La L.K.K enkadrigos la ekskurzojn en la kutimaj ekskurzoj en Lourdes. Tiel nenia ekskurzo estos nuligata pro nesufiĉa partopreno. Ili estos anoncata en la kongreslibro kaj je la malfermo de la kongreso estos okazo sin anonci kaj..... pagi.

RADIO ROMA VIA VENETO 56 Roma (Italia)

Grava informo!

La poreksterlanda servo de Radio Roma organizas, por monato decembro,grandan konkurson kun premioj, por ĉiuj siaj radioaŭskultantoj en ĉiu parto de la mondo. La konkurso estas kunligita kun la itala produktado. La kondiĉoj por partepreno estas la jenaj Estos menciataj kaj ilustrataj, dum la dissendo iuj italaj produktaĵoj. La radioaŭskultantoj devos transskribi la nomojn de la produktaĵoj, kiujn ili ŝatus havi, ilin indikante unuope en apartaj folioj aŭ kartoj, nome, unu karto aŭ unu folio, por ĉiu elektita produktaĵo, aldonante tre klare, sian nomon, antaŭnomon kaj adreson La leteroj aŭ kartoj estu sendataj al RADIO ROMA Concorso Premi Via Veneto 56 Roma (Italia). Ĉiu radioaŭskultanto povas sendi senliman nombron da indikoj, eĉ por ĉiuj produktaĵoj menciitaj, kaj tiel li povos havi pli da ŝancoj en la lotumado de la premioj.

La detala programo en Esperanto estas anstataŭata de la ĝenerala programmo enhavanta ĉiujn dissendojn de Radio Roma, en la diversaj naciaj lingvoj, krom Esperanto.Al la esperantista publiko ni konfirmas ke la elsendoj en Esperanto okazas, kiel kutime, ĉiumerkrede kaj ĉiuvendrede, de h 19 ĝis h. 19,20' (M.E.T.)per la jenaj mallongondaj stacioj metroj 25,21.= kc/s 11,90,metroj 31,35 = 9,57,metroj 49,92 = kc/s 6,01 La temoj restos interesaj, la prelegoj altnivelaj, la paroladoj auskultindaj.

De 1 Januaro 1953 ĝis 1 Aprilo la Katolika Radio Stacio-HILVERSUM-Nederlando elsendos je ondolongo 298 m.Bonvolu raporti pri la elsendoj de katolikaj novajoj je ĉiu sabato 23,15 h. Via instigo estas la sukceso por daŭrigi tiun servon!

KORESPONDADO

s-ro C.Bommer, Harenkarspel B 53 d, TUITJENHORN (N-H-), Nederlando, korespondos k.c.l. per ilustritaj postkartoj. Certe respondos al ciuj.